

Heroldo de Esperanto

Sendependa organo de la Esperanto-movado / Semajna / Internacia / Universala

Administracio: Köln a. Rh. (Kolonjo), Brüsseler Strasse 94, Germanujo.
Redakcio: Cefredaktoro: Teo Jung; resp. redaktoro: Joseph Berger;
anonca redaktoro: Michael Wieland. La redakcio ne resendas manu-
skriptojn aŭ fotografaĵojn; retenu por vi kopion! **Telefono:** 5 68 93
Subfakoj: Librejo kaj Presejo. Skribante al ni, uzu por ĉiu fakoj
(administracio, redakcio, librejo kaj presejo) apartajn foliojn! —
Prezo de Abono (nur antaŭpage): 15 germ. rmk.; mendita per la poŝto
aŭ rekte ĉe la eldonejo: 12 germ. rmk. Oni povas pagi kvaronjare.

Dekunua Jarkolekto
N-ro 52 (600)
26 decembro 1930
(4-paĝa)

Prezo de Anoncoj: po unucentimetra kolonero (62 mm larĝa) 1.20 rmk.
Anoncoj (nur antaŭpage) kostas po vorto aŭ mallongigo 0.05 rmk.,
minimуме 1.— rmk. **Rabato:** 3× enpresio 10%, 5× 15%, 10× 20%.
Poŝtaj ĉekkontoj: (ĉiuj niaj kontoj funkcias sub la firmo „Heroldo de
Esperanto, Köln, Germanlando“): Bruxelles 204.404; Budapest 59.379;
København 49.62; Köln 1117.76; Milano 3/954; Praha 781.93; St Gallen
IX/4602; Stockholm 41.80; Warszawa 191.094; Wien D 62.473;
Zagreb 408.14; Zeist 130.630. — **Banka konto:** Deutsche Bank.

Princo de Siamo subtenas Esperanton.

Li promesis enkonduki ĝin en la lernejojn. — Renkontiĝo de hinda esperantisto L. Sinha kun princo de Siamo en Estonujo.

La princo de Siamo Aditya Jumbhar, kiu oficas en sia patrolando kiel oficejo-ĉefo en la ministerio por internaj aferoj, entreprenis en pasinta aŭtuno studvojaĝon en Eŭropo, por konatiĝi kun la administraj aferoj en diversaj ŝtatoj. Ankaŭ en la ĉefurbo de Estonujo lia princa moŝto restis kvar tagojn; li de tie forveturis la 16-an de novembro.

La esperantistaro scias ke en aŭtuno prelegadis en Estonujo nia hinda samideano, membro de l' Tagore-Instituto proksime de Kalkuto, s-ro Laksmisvar Sinha. Komprenoble interesis lin, kiel samgentulon, renkonti la princon, por iom paroli kun li pri ĝeneralaj aferoj. Do, la 16-an de novembro nia hinda pioniro vizitis la princon en hotelo de Talino, portante en sia paperujo ankaŭ sufiĉe da anglalingva propagandmaterialo pri Esperanto.

Unue ili parolis pri ĝeneralaj politikaj kaj kulturaj aferoj, sed poste s-ro Sinha lerte turnis la konversacion al Esperanto, demandante la princon:

„Ĉu vi ankaŭ konas la Esperanto-movadon?“

„Jes, en Eŭropo mi aŭdis pri ĝi“, respondis la princo.

Tuj samideano Sinha rakontis, kiel al li Esperanto malfermis la mondon, donante okazon per ĝi ekkoni la nordajn landojn kaj popolojn de Eŭropo, iliajn animojn kaj kulturojn. Same samideano Sinha forte akcentis la favoran rilaton de l' japana kaj ĉina ŝtatoj al Esperanto.

La rezulto de la konversacio, kiu daŭris proksimume dudek minutojn, estis ke lia princa moŝto sincere promesis morale subteni Esperanton kaj klopodi por enkon-

duki ĝin en la lernejojn de Siamo.

Por pruvi la gravecon kaj la grandan disvastiĝon de Esperanto samideano Sinha restigis ĉe la princo kelkajn Esperantajn librojn, interalie jarlibron de UEA, lernolibron en angla lingvo, samlingvan ŝlosilon kaj ekzempleron de Heroldo.

La promeso de lia princa moŝto certe estas valora, ĉar li mem vidis kaj spertis la lingvajn malfacilaĵojn inter la popoloj; kiam samideano Sinha parolis pri la favoraj rilatoj de grandaj komercaj ĉambroj al Esperanto, la princo respondis:

„Tute nature oni devas akcepti internacian lingvon!“

Ni devas aldoni, ke la promesoj de l' princo Aditya des pli valoras, ĉar li ne nur estas princo, sed ankaŭ aganta gvidanto de internaj aferoj de Siamo. Tial liaj ordonaj kaj konsilaj vortoj en la ministerioj de Siamo havos grandan signifon. Ni esperu ke lia princa moŝto plenumos la promesojn, kiujn li donis al nia samideano Laksmisvar Sinha en la ĉefurbo Talino.

N. Ruus.

Pola sciencisto Johano Sniadecki pri la lingvokorekto.

Johano Sniadecki, naskita en 1756, mortinta en 1830, fariĝis doktoro de filozofio en Krakova Universitato kaj profesoro de matematiko (1780) samloke. Li estis ne nur granda sciencisto, sed ankaŭ perfekta lingvoamanto. Ni citas kelkajn prilingvajn ideojn prenitajn el liaj „Leteroj pri pola lingvo“, verkita komence de l' 19-a jarcento:

„... Lingvo estas montrilo de l' grado, kiun la nacio atingis en civilizaco kaj klareco. Se ĝia lingvo estas malklara, kruda, vortmalriĉa t. e. malriĉa je esprimoj pri aĵoj, sentoj, ideoj, pasioj kaj ties diversaj nuancoj, variaĵoj kaj gradoj; se ĝiaj reguloj pri nomado, elparolo kaj skribmaniero ne estas fiksitaj kaj bone difinitaj: la nacio ne estas ankoraŭ elirinta el la stato de sovaĝeco, nek rajtas aparteni al kleraj, civilizitaj popoloj... Neniom utilas la gramatikaj reguloj de Kopczynski, tiel diligente elserĉitaj, tiel science kaj funde elmontritaj, dum ni nek obeas nek observas ilin en la uzado. Neniom utilas la grandega laboro de Linde en lia etimologio kaj vortaro, kiun li verkis, por konigi al ni la veran signifon de vortoj kaj esprimoj kaj por igi nin uzi ilin ĝuste kaj korekte. Neniom ili utilas, ĉar aperis riĉa aro da kvazaŭaj geniuloj, reformistoj kaj vortfabrikistoj, kiuj subpremas ĉian prestiĝon de niaj grandaj verkistoj kaj mem anoncas sin doktoroj de la nacio!...“

En ĉiu nacio la lingvaj legdonantoj estas la grandaj oratoroj kaj verkistoj.

Antaŭe oni parolas kaj verkas korekte, kaj nur poste, el la bonaj modeloj, oni ĉerpis regulojn de parolado kaj skribado; ĉar reguloj similas ne tiom al perfektigiloj de la lingvo, kiom, preferere, al policaĵaj leĝoj kies tasko estas konservado de l' publika ordo.

Kiam talentegulo kreas novan esprimon por nove kreita ideo aŭ bildo, aŭ por elvoki en la legantoj novan kormovon, tia esprimo devas esti sankta, kiel vera eltrovaĵo kaj nova riĉigo al la lingvo...“

Libroj kaj verkoj ne instruas la bonan elparoladon; oni devas aŭskulti la el-

paroladon ĉe la koncernaj provincojn. Lwów estis ĉefurbo kaj ĉeflernejo de bona pollingva elparolado, ĉar tie la lingvo estis agrable sonigata — ĝis antaŭ nelonge. Hodiaŭ (1815) Lwów estas multe germanigita kaj, kiu volas lernigi al sia orelo la dolĉon de la lingvo, devas iri al vilaĝanoj proksime de Jarosław (Galicio, nun: sud-orienta Pollujo) loĝantaj.

Lingvo devas esti klara, simpla kaj riĉa.

La unua eco konsistas en tio, ke ĉiu

aĵo devas esti ĝuste-propre nomata kaj la uzita nomo devas esti komprenbla por ĉiu.

Neniu lingvo povas malhavi, ke apudaj vortoj montras la veran signifon de la koncerna esprimo¹⁾; tion ju malpli la lingvo bezonas, des pli el si mem klara ĝi estas. La klareco de la lingvo estas, krome, malbonigata per iom oftaj skriberaroj, per tro oftaj kaj longaj pa-

¹⁾ La aŭtoro pensas pri t. n. kunteksto.



Kristnasko — la festo de malgrandaj (kaj grandaj) infanoj.

Ankaŭ la festoj havas sian evolu-historion. La desegningo de nia bildo kaptis la ĉefajn etapojn: Unue okazas la grava, tre grava skribado de la longega dezirbileto — poste la „kristnaskoviro“ paŝas tra sonĝoj kaj revoj — ĝis kiam aperas la tago de l' plenumo, la tago de l' brilluanta kristnaska arbo — kaj fine, post ĉia festoĝojo, la infano tenanta siajn novajn trezorojn en la brako dolĉe kaj pace endormiĝas.

Mondvojaĝo por Esperanto

organizita de ICK de la Esperanto-Movado, Ĝenevo.

La unuaj tagoj en Japanujo.

Joseph R. Scherer, speciala delegito de Internacia Centra Komitato.

Interesa estis la alveno en la haveno de Yokohama. Kortuŝa estis la bonvenigo de la japanaj samideanoj sur kaj apud la ŝipego. Dudeko da esperantistoj, famkonataj kaj novuloj. De Tokio (30 km) venis unuj, aliaj el Yokohama. Aro da verdaj standardoj flirtis sur la kajo. Sed ankoraŭ mi estis okupita per la respondado de multaj demandoj al kvin ĵurnalistoj, kiuj en boato estis veturintaj renkonte al la alvenanta ŝipo. La samideanoj en Tokio estis multe laborintaj por grandstile publikigi mian alvenon kaj vojaĝon ĉirkaŭ la mondo. Tri gazetoj sendis fotografiston kaj mi devis komplezi per „gravula rideto“, malfacile por mi.

Post multa fotografado sur la kajo, kaj teo-paroladetoj inter la samideanoj de Yokohama la tramvagonaro portis min kaj tutan grupeton da entuziasmaj verdsteluloj al Tokio. Ĉar la japanaj dometoj estas „terure malgrandaj“ laŭ diro de la samideanoj, mi ekloĝis en la Y. M. C. A., kie Esperantaj kunvenoj ofte okazas.

Mi komencis tralegi la kvinsemajn programon de mia vojaĝo tra Japanujo. Jam la ĵurnalistoj sur la ŝipo donis al mi kopion. Ŝajnis ke ĉiuj homoj havis kopion. Sed pro la multa babilado mi ne trovis la tempon por zorge tralegi ion.

Je mia plej granda surprizo neniam aranĝoj estis faritaj por vizito al la mondfama monto Fujiyama, kvankam mi pri tio petis al la Japano Esperanto-Instituto. Estis alvenintaj invitoj por mia vizito el ĉiuj anguloj de Japanujo, kaj multaj ne povis esti akceptataj. Pro tio kaj ankaŭ pro la fakto ke la monto estas sankta kaj ne vizitebla de vojaĝantoj, escepte dum la pilgrima sezono (julio kaj aŭgusto) mi rezignis la plenumon de multjara sonĝo en mia svisa koro, iam grimpi sur la Fuji. Malfacila decido! Sed Esperanto ja estas pli proksima al mia koro ol eĉ montgrimpado.

Post tagmanĝo en manĝejo, kie la vortoj „Cash Register“ estis la solaj anglaj vortoj, ni vizitis la librovendejon „Tokio Do“. Mi miris trovi 150 diversajn Esperantajn librojn en speciala angulo; grandlitere salutis la vorto „Esperanto“. Bonega propagando por Esperanto! La direktoro de la librejo prezentis teon; sekvis fotografado.

Vizito al la Ginza-strato, kiu nomiĝas ankaŭ „Broadway de Tokio“ kaj ĉeesto ĉe la „Arĝenta Kunsido“ inter babilemaj sed timemaj samideanoj. Poste aĉeto de unu el tiuj mondfamaj, originalaj japanaj, silkaj „pajama“. Sekvis neforgesebla horo, nome vespermanĝo en la domo de kaj kun la mondfama samideano Ossaka. Li estu konata ne nur kiel verkisto kaj scienculo, sed ankaŭ kiel plej bonkora, afabla kaj sincera amiko, la animo de la Esperanto-movado en tiu parto de la mondo. Feliĉe por Esperantujo, li resaniĝis de senespera atako de tifo. Mi sidis sur miaj genuoj, japanmaniere, kaj s-ro Ossaka miris pri mia lerteco en la uzado de la manĝebastonetoj. La loko ne permesas priskribi la tipan vespermanĝon. Cetere nia estiminda s-ro Jung (la ĉefredaktoro!) jam manĝis japane (kun s-ro Ossaka en Berlino kaj do li sendube ne presigus mian priskribon.

Post vizito al la oficejo de la Japana Esperanto-Instituto, kie mi renkontis alian grupon da samideanoj, mi fine trovis tempon por skribi kelkajn vortojn en mia ĉambro.

Vizito al Nikko estas neforgesebla. La japanoj diras: „Ne uzu la vorton, mirindebela“ antaŭ ol vi vidis Nikkon!

La urbo mem kun 10 000 loĝantoj, 500 metrojn alte en la montaro, 150 km de Tokio, estas neinteresa urbo. Tamen la mirindaj temploj en ĝia proksimeco reprezentas la kristaliĝintan civilizon de Japanujo dum la lastaj 300 jaroj. En maizoleo sur la pinto de monteto, kovrita de multegaj luksaj temploj, kuŝas la restaĵoj de la plej fama ŝoguno, Iejasu. Unu el tiuj potenculoj, kiuj dum 700 jaroj estis regantoj de Japanujo. Kvankam la imperiestra familio regajnis la povon antaŭ 60 jaroj, en la okuloj de la japanoj

la mortaj ŝogunoj estas sanktigataj, kaj por ĉiu estis konstruata mirinda nova templo en Nikko, la plej sankta urbo en la „Lando de la leviĝinta Suno“. La tuta montflanko estas fakte kovrita per pagodoj, lanternoj, sanktejoj, torii-pordegoj, kaj maizoleoj. Ĉiuj rebrilas la plej altan evoluon de la japana kaj ĉina arto, unu post la alia, ĉiam pli alten, ĝis ĉe la supro troviĝas la tomo de Iejasu, la Napoleono de Japanujo.

Mirindaj estas la vidaĵoj, sed ili estus eniĝaj al fremdulo, se ne inteligentaj japanoj klarigus la misteraĵojn. Tiaj japanoj ĝenerale ne estas troveblaj por gvidantoj. Nur monotonaĵoj pagitaj kon-

la koro ne nur geografie, sed ankaŭ religie. Nikko estas la plej sankta valo por la popolo, kies religioj predikas adoradon al la prauloj, ĉar tie estas entombigitaj la plej sanktaj prauloj en Japanujo, la ŝogunoj, kiuj antaŭe regis la landon, dum kiam la imperia familio estis sen potenco.

Kvankam mi renkontis multajn, kiuj ne estas religiema, preskaŭ ĉiuj japanoj, ĉu anoj de la Sintoismo aŭ Budhismo, kredas je la adorado al siaj prauloj. Eble ili ne sekvas aŭ plenumas ĉiujn aŭ iujn formalaĵojn kaj ritojn. Sed tamen ili respektigas siajn prapatrojn kaj tiujn de la imperiestro kaj de la ŝogunoj.

La ĉiutagaj agoj de la japano estas direktataj de la deziro neniam malaltiĝi la nomojn de siaj prauloj iumaniere. La japano estas ĉiam sub la gardantaj



Parolado pri Polujo en Oviedo.

La bildo prezentas mian fervoran batalanton el Asturio (Hispanujo), s-ron Jiménez Mora (en uniformo), lian episkopan moŝton de Oviedo kaj la prezidanton de la Katolika Klubo de Oviedo, s-ron eksurbestron Ladreda.

La parolado okazis la 27-an de novembro 1930 en la ejoj de la Katolika Klubo, kie ĉeestis amaso da homoj kaj, krom la nomitaj, ankoraŭ multaj aliaj eminentuloj. La paroladanto, majoro Jiménez Mora, montris per elokventaj vortoj kaj belaj lumbildoj la karakterizaĵojn de Polujo kaj de ĝiaj interesaj urboj, inter kiuj li komparis Krakovon kun la hispana urbo Toledo. Ankaŭ poezion, sciencan, pentrarton, morojn kaj kostumojn polajn li pritraktis en sia parolado, dum kiu li akcentis la gravan rolon de Esperanto kaj aludis la venontan internacian kongreson en Krakovo. Entuziasma aplaŭdo kronis la interesan paroladon.

dukistoj, kiuj parolas malbonan anglan lingvon, aŭ germanaĉan aŭ fifrančan, estas haveblaj por ordinaraj turistoj. Sed feliĉe mi estas esperantisto.

Kiom pli agrablaj estas ekskursoj kun samideanoj! Ili ĝenerale ne scias tiom da detaloj pri la vidindaĵoj, sed duono de la vortoj de gvidistoj ne estas komprenata kaj la alia duono estas tuj forgesata. La ĉefajn informojn oni ja trovas en gvidlibroj, se oni ŝatas detalaĵojn. Cetere por la ĉarma lando de la krizantemoj ekzistas bonega Esperanto-gvidlibro kun multaj fotoj, verkita de la Japana Esperanto-Instituto.

Vojaĝante kaj promenante kun lokaj esperantistoj oni pli intime kaptas la spiriton de la lando kaj speciale de la vidindaĵoj. Feliĉe estis ke du samideaninoj venis kun mia grupeto. Tiu estis la sola okazo dum la du unuaj semajnoj. Ili estis la edzinoj de Prof. Okamoto kaj artisto s-ro Oohaŝi. Krom tiu kvarono venis du studentoj, s-roj Kidasaki kaj Ito. Plue s-ro Nico Slinger, holanda ĵurnalistoj, kiu lernis Esperanton de mi en Los Angeles, post parolado en Hollywood, kaj nun ekvojaĝas parte kun mi tra Japanujo kaj tra Ĉinujo, Indoĉinujo, Siamo al Javo, kie li ekpropagandos por nia movado. Kun mi do estis „gaja oko“ kiu volis pasigi dimanĉon (4. 10.) en la serena sankteco de Nikko.

Kio estas Taj Mahal por Hinduoj, tio estas Nikko por Japanoj. Unu el la plej belaj lokoj en Japanujo, Nikko estas

okuloj de siaj prapatroj; tiel klariĝas ke la ĝenerala moralo de la japana popolo estas tre alta. Kristanoj perdas sian religion tute aŭ parte kaj tiam ili havas nenian moralan subtenon, kompareblan al tiu, kiun la japanoj havas en la adorado al siaj prauloj, eĉ se ili estas senreligiaj. Eĉ fervoraj kristanoj devas tion konfesi, kaj estas do dece viziti sanktan lokon kiel Nikko kun plena respektu kaj komprenemo al la religioj de la japana popolo.

Pli ol 6000 viroj, kiuj estis la plej bonaj artistoj kaj metiistoj de Japanujo, laboris dum 12 jaroj por plenumi la grandiozajn planojn por la konstruado de la temploj. La tiama kosto estis dek milionoj da dolaroj, sed hodiaŭ oni bezonus almenaŭ 50 milionojn da dolaroj. Sube troviĝas la Sankta Ponto pentrita per dika lako ruĝega, kiu rajtas uzi nur la imperiestra familio. Neniu blankulo marŝis sur la 25 m longa ponto. Ĝeneralo Grant siatempe oficiale ricevis honorigan privilegion, sed li delikate kaj diplomate rifuzis, tiamaniere altigante sin en la okuloj de ĉiuj japanoj. Kelkajn metrojn apude troviĝas ordinara ponto por simplaj mondanoj, ĉar la rivero estas profunda kaj ofte sovaĝa.

La temploj estas serenaj, malhele brunaj, sed tamen ili brilas, ĉar la randaĵoj rebrilegas je oro. La granda pagodo estas alta pli ol 30 m kaj estas unu el la plej mirindaj en Japanujo. La plankoj de ĉiuj temploj estas kovritaj per dika

ruĝa lako, kaj konstante ni devis formeti la ŝuojn, ĉar nur per ŝtrumpoj oni rajtas marŝi sur la valora koloraĵo.

La arkitekturaj belecoj de Nikko estas priskribitaj en grandaj libroj, kaj la samideanoj povas trovi pliajn detalojn en la librejoj. Tamen mi volas aldoni ke la temploj montras ne japanan sed ĉinan, pli riĉan kaj pli multekostan arkitekturon. La ŝogunoj tiel volis montrisian povon, samtempe postulante alt-egajn monsumojn de siaj subŝogunoj, malriĉigante ilin, kaj malebligante la plenumon de militantaj deziroj.

Sekvis vizito al la fama Ĉuzenji-Lago kaj al la Kegan-Akvoŝalo (75 m) pere de privataj aŭtomobiloj. La lago estas somerrestadejo. Ĉar jam estis oktobro, la vetero estis tre malvarma, kaj dum nia reveturo komencis pluvegi kaj fulmotondri terure. Estis la unua pluvo kiu mi travivis de post majo (en Los Angeles). Kvindek akraj kurboj malrapidigis la malsuprenveturadon al la stacidomo de Nikko. Tamen ni ne perdis la bonhumoron. Tute speciale mi volas danki al la du ĉarmaj edzinoj, kiuj multe helpis gajigi la neforgeseblan tagon. Revenante al Tokio, tre malfrue en la vespero, ni informiĝis ke tie estis bele, la tutan tagon.

Mia unua labortago! London matene je la 9-a horo s-ro Hirasaua venis al mia loĝejo kun detala laborplano. Vere la Japana Esperanto-Instituto estis kaj estas laboranta mirinde. Aro da plej lertaj komitatoj, pri kiuj mi parolos pli poste, iom post iom, subtenas la spiritan gvidanton ne nur de la Instituto sed de la tutjapana movado. Se la japanaj samideanoj aplikos siajn religiojn ankaŭ al prauloj en nia movado, s-ro Ossaka estos siatempe (espereble post tre longa tempo) sanktigata. Kaj se la tiamaj japanaj samideanoj sekvos lian spiriton kaj animon, nia movado en Japanujo modele kreskos, ĝis la fina venko.

Fervoran sekretarion la Instituto trovis en la persono de s-ro Hirasaua, kiu estas helpata de f-ino Kamesaki ĉi-posttagmeze kaj de aliaj samideanoj, vespere. Dum miaj tagoj en Tokio la Japana Esperanto-Instituto disponigis al mi sian lertan, fervoran kaj energian sekretarion, kiu krom sia rolo de oficiala sekretario afable helpis min kvazaŭ privata sekretario. Do dufojan dankon al li.

Post kelkaj privataj, privojaĝaj negocoj, ni vizitis la Ministrejon de Statfervojoj, kie ni renkontis kelkajn eminentulojn kaj ankaŭ s-ron Ossaka, kiu estas grava sekcia ĉefo. Vizito al la Yokohama Specie Bank, kie la prezidanto ĉe taso da japana teo babilis kun mi pri japanaj kaj amerikaj financoj. Neniajn maŝinojn mi vidis aŭ aŭdis en la granda banko. Mirigis min la fakto ke multaj tre junaj knabinoj laboras en oficejoj. Ĉe ŝanĝado de usona mono, la japana egalvaloro estis prezentata en paila telereto. Virinoj portis siajn belajn ledajn monujojn en silkaj pakajtukoj laŭ japanan manieron. Jes, oni importas la monujojn, sed tamen la japana portmaniero ne ŝanĝiĝis.

Tagmanĝo ĉe Prof. D-ro Kuroita de la Imperia Universitato en Tokio estis vera plezuro kaj honoro. Siatempe plej vigla propagandisto por nia movado, li vidas kun ĝojo, kiel Esperanto nun progresas en Japanujo. Kvankam tre okupata li ĉiam estas preta doni sian eminentan influon kaj helpon, kiam tio estas necesa. Multe vojaĝinte, Prof. Kuroita povis lerte paroli pri la landoj de mi vizitotaj.

Aliĝis al nia grupeto s-ro Kidosaki, ankaŭ tre lerta esperantisto, studento ĉe la universitato, aŭtoro de bonega Esperanto-libro por japanoj. Estas vera ĝojo konstati, kiom bele kaj lerte la japanoj parolas nian lingvon. Vere, kelkaj havas malfacilaĵojn pri la „L“. Sed kun iom da praktiko kaj forta volo multaj lernis kaj ĉiuj aliaj povos lerni la korektan elparoladon. Aliaj landanoj devas peni pri aliaj literoj nekonataj.

Vizito al la du ĉefaj gazetoj de Japanujo. Unue vizito kun la redaktoroj de la tutjapana gazeto „Niĉi-Niĉi“, kiu antaŭtage jam enhavis mian bildon (surŝipa) kun longa artikolo, pri miaj eldiroj sur la ŝipo kaj pri mia vojaĝo ĝenerale.

Vizito al la „Tokio Asahi Tagjurnalo“, kie laboras fervora kaj eminenta samideano, s-ro Toki, aŭtoro, poeto kaj batalanto por la latina skribo por la japana lingvo.

Vizito al la Tokio-Teatro estis bona ideo de s-ro Ossaka. La tuta programo daŭras ses horojn, de la kvara ĝis la deka. S-ro Ossaka, kiu afable invitis min kaj mian holandan amikon, estis preta forlasi la teatron frue, eble je la sepa, ĉar ni eksterlandanoj certe enuos pro la stranga japana kaj japanlingva ludado. Sed li eraris. Li forgesis ke ni ambaŭ estas ĵurnalistoj kaj havas du bonajn okulojn. Mi eĉ uzis trian, fotografante per mia „Leica“-kamero. Tio estis facile ebla, ĉar la aktoroj tiel malrapide aŭ dum multaj minutoj tute ne sin movas. Krom tio ni ambaŭ skribadis kaj notis interesajn detalojn. La afabla traduko de s-ro Ossaka de la ĉefa enhavo de l' teatraĵoj multe helpis por la kompreno de viditaj strangaĵoj. Estis preskaŭ la deka horo, kiam ni forlasis la teatron, kio montras ke ni fremduloj ne enuis,

La programo konsistis el tri teatraĵoj: antikva dramo, amludo kaj komedio. Inter la unua kaj dua teatraĵoj, iom post la sesa horo, estis tempo por vespermanĝi. S-ro Ossaka invitis nin al la luksa restoracio de la teatro mem, kie ni manĝis eŭropaniere.

Grandan rolon en la japanaj antikvaj dramoj ludas kantisto kun stranga voĉo; liutisto kun trikorda instrumento, kies malgajaj tonoj bone akordiĝas kun la ofte plorkria gorga voĉo de la kantisto; tamburisto, kiu estas kaŝita malantaŭ la kurtenoj; kaj taktisto, kiu per du lignotabuletoj donas „ritmon“ al la alproksimiĝantaj kaj forkurantaj geaktoroj, frapante la plankon. La kantisto tre multe rakontas pri la enhavo de la teatraĵo, kaj la geaktoroj do ne bezonas paroli tiel multe, sed sidas dum longaj minutoj senmovaj sur la planko, japanmaniere. Malantaŭ ĉiuj ĉefaj geaktoroj sekvas kaj sidas sufloro, vestita en nigra vestaĵo kaj nigra masko. Eĉ sur la poŝtkartoj de la aktoroj oni vidas malantaŭ ili nigran ombbron, kiu estas la sufloro. Interese estas cetere, ke la viroj, kiuj ludis la rolojn de virinoj, tre sukcese personigas japaninojn. Komence mi tute ne supozis iun trompon, sed je la fino mi memoris pri tio, kion mi legis el libroj: ke virinoj tute ne ludas sur la scenejoj. Laŭ s-ro Ossaka la modernaj teatraĵoj nun havas ankaŭ „verajn virinojn“.

Pri la scenejo mi povus skribi tutan libreton kaj same pri la vizitantoj kaj la teatrodomo. Sed tempo mankas kaj same loko. Eble mi devus aldoni du liniojn pri la sidmaniero en la tria klaso (balkonoj). Dum ke estas ordinaraj seĝoj en la unua kaj dua klasoj, la tria klaso ne havas aliajn sidilojn krom kusenoj mezurantaj trionan kvadratmetron. S-ro Ossaka opiniis, ke mi devus aĉeti tri biletojn de tria klaso por doni al miaj kruroj spacon.

La unua teatraĵo montris la vivon de ŝogunoj antaŭ multaj jarcentoj, kaj juna knabo devis sin mortigi. Tion li fine faris en la mezo de la teatraĵo, sed li ankoraŭ parolis preskaŭ ĝis la fino de la dramo. La dua montris la malfacilaĵojn de forkurintaj geamantoj. En la tria teatraĵo malriĉa japana mortinto estis portata de dometo al domaĉo kaj dancigata je la teruro de la vizitantoj, kiuj fine konsentis doni monon por deca enterigo kaj manĝejo. Tre interesa komedio por eŭropanoj, kiuj deziras studi viv- kaj pensmanierojn de popoloj.

Samvespere mi havis la honoron interkonatiĝi kun alia esperantista eminentulo en Tokio-distrikto, nome **Prof. Oishi**, estro de la aerologia observejo kaj fama sciencisto, kiu skribas ĉiujn siajn raportojn en Esperanto.

Vizito al la oficejo de la Japana Esperanto-Instituto, kie oni povas konstante trovi samideanojn, kaj enlitiĝo je noktomezo.

Propaganda vojaĝo de s-ano Sinha Ira Polujo.

Akademia Esperantista Rondo ĉe J. A. H. (Warszawa. Nowy Swiet 21), interkonsentis kun P. E. D. entreprenis organizon de la propaganda vojaĝo de la konata hinda samideano tra la tuta Polujo en februaro 1931. La societoj, UEA-delegitoj k. a., dezirantaj eluzi tiun unikan propagandon, interrilatiĝu kun la Rondo plej malfrue ĝis 5-a de januaro 1931.



Lastmomente:

La Prezidanto de Pola Respubliko, Prof. J. Mościcki, akceptis en aŭdienco Prof. Bujwid, Loth, Nowakowski kaj Karolczyk, kiuj petis lin akcepti la protektorecon super la 23-a Universala Kongreso de Esperanto, okazanta en Kraków de la 1-a ĝis 8-a de aŭgusto 1931. La Prezidanto bonvolis akcepti. D-ro Dreher.

Listo de aliĝintoj.

1. Schierer, Jos. R., Los Angeles, Usono.
2. Warden, John Mabon, Edinburgo, Skotl.
3. Philippet, D-ro, Paris, Francujo.
4. Pirchan, Paula, s-ino, Waidhofen a. d. Th., Aŭstrio.
5. Ommen, M. T., Ing., den Haag, Nederl.
6. Kennedy, David, Glasgow, Skotlando.
7. Cseh, Andreo, den Haag, Nederlando.
8. Isbrücker, J. R. G., Ing., den Haag, Nederlando.
9. Isbrücker, Julia, s-ino, den Haag, Nederl.
10. Bujwid Odo, D-ro, Prof., Kraków, Pol.
11. Tiard, Marcelle, s-ino, Paris, Francujo.
12. Gueritte, Tony Jules, Ing., Surbiton, Anglujo.
13. Baird, Jane, f-ino, Edinburgo, Skotlando.
14. Wrześniewska de la Bruyère, E., s-ino, London, Anglujo.



La soleno de l' transdono de la Nobel-premioj de paco

al la eksa usona ŝtatestretario Kellogg (X) por 1929 kaj al la sveda ĉefepiskopo D-ro Soederblom (apude) por 1930; la soleno okazis — aparte de la transdono de l' ceteraj Nobel-premioj — en la domo de l' Nobel-Instituto en Oslo.

15. Meyer, Ernst, D-ro, Saarbrücken, Saar-teritorio.
16. Robertson, Robert, Wood Green, Angl.
17. Elaise, Paul, North Harrow, Anglujo.
18. Blaise, Margaret L., s-ino, North Harrow, Anglujo.
19. Le Brun, Paul, London, Anglujo.
20. Le Brun, Gertrude, s-ino, London, Anglujo.
21. Gregg, John, Robert, New York City, Usono.
22. Patai, Samuels, D-ro, Budapest, Hungarujo.
23. Patai, Georgine, s-ino, Budapest, Hungarujo.
24. Krieger, Jeanette Elisabeth, s-ino, s'Gravenhage, Nederlando.
25. Neuberger, Julia, s-ino, Kraków, Polujo.
26. Hub, Franz, Gablonz a. N., Ĉeĥosl.
27. Fasce, Ettore, Genova, Italujo.
28. Hermelin, Emilja, f-ino, Warszawa, Pol.
29. O'Brien, Elizabeth, f-ino, London, Angl.
30. O'Brien, Susanna Greeves, f-ino, Worthing, Anglujo.
31. Schatz, Ewa, s-ino, Warszawa, Polujo.
32. Peksa Stanisław, Czarny Dunajec, Pol.
33. Schönrich, Kurt, Wiesbaden, Germanujo.
34. Pickard, John William, Gorton, Manchester, Anglujo.

Postkongreso en Budapeŝt.

La samideanoj, kiuj rememoras la pasintjarajn, belajn kongrestagojn en Budapeŝt, certe kun ĝojo salutas la sciigon pri la venontjara Budapeŝta postkongreso. La Loka Komitato de la postkongreso nun fondiĝis, sub la prezidanteco de D-ro K. Kalocsay. — Samtempe oni fondis komitaton por la aranĝo de karavanaj aferoj, kies celo estas unuigi la karavanojn kaj opajn personojn, kiuj vojaĝante al Kraków, trairet Budapeŝton. La prezidanto de tiu ĉi komitato estas Béla Szász. — Ĉu pri postkongresaj, ĉu pri karavanaj aferoj informojn donas la ĉefsekretario: D-ro F. Szilágyi, Budapeŝt II, Csalo-gány-u. 33.

Nova sukceso en Norvegujo.

Post la sukcesaj porinstruitaj kursoj ĉi-somere gviditaj de pastro Ĉe en la universitato de Oslo, la intereso por Esperanto ĉe la publiko senteble plivigliĝis, kaj multaj, kiuj ne povis partopreni la kursojn de Ĉe, postulis novan Ĉe-metodan kurson en la aŭtuno.

Precipe pro bona varblaboro de f-ino Sparre, Norvega Esperantista Ligo iniciatis la aranĝon. Pro la malfrua tempo estis malfacile akiri taŭgan eksterlandan instruiston; sed lastthore la Internacia Ĉseh-Instituto en Hago sendis al ni D-ron ing. Ottmar Fischer el Stuttgart kiel gvidanton de la kurso. Helpe de la intereso flanke de la geinstruitaro kaj precipe de f-ino Erich-

tris lumbildojn pri Hungarujo; tradukis f-ino M. Erichsen.

Tuj poste la kursanoj dum adiaŭa festo montris sian entuziasmon kaj por Esperanto kaj por la instruisto per paroladoj en prozo kaj en poezio, krome per transdono de honordiplomo kun subskribo de ĉiuj kaj per multaj aliaj pli malpli humoraj donacoj.

Dum sia restado en Oslo D-ro Fischer tute dediĉis sian tempon kaj forton al la servo de la verda stelo. Ekster la kurso li faris 12 provlecionojn en diversaj gravaj asocioj kaj kluboj, ekz. de bankrevizoroj, komercaj geoficistoj, komercistoj, policistoj, junuloj, bontemplanoj, vegetaranoj, multaj geinstruitoj kaj gelernantoj de popollernejoj (inter ili ĉefinstruitoj de pluraj lernejoj), bankoficistoj. Entute li provlecionis antaŭ ĉ. 500 personoj kaj tiel faris gravan servon al la norvega movado.

Pluraj gravaj gazetoj — tagaj kaj fakaĵoj — havis artikolojn kaj intervjuojn kun fotografajoj.

La someraj kaj aŭtunaj kursoj en Oslo kun la multaj provlecionoj senteble kreskigis la ĝeneralan intereson por Esperanto, ne nur en Oslo sed tra tuta Norvegujo, ĉar la provincaj gazetoj kutimas represii artikolojn aperintajn en la ĉefurba gazetaro.

R. B. P. kaj A. A.

Esperanto kiel lingvo de eŭropa ŝtata konfederacio.

La direktoro de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado Genève informas nin, ke la iniciato de la grupo „Esperantanaro-fajro“ en Barcelono, kaj menciita en „Hispana Esperanto“ n-ro 9/10, 1930, estis ĝis nun ne konigita al ĝi kaj, ke ĝi neniam ricevis informojn pri tio. La ICK ĵus turnis sin al la Hispana Esperanto-Asocio kaj la Kataluna Esperanto-Federacio (ambaŭ membroj de KR) por ekscii, ĉu kaj kiaforme la iniciato okazas en kunagado kun tiuj asocioj aŭ kun unu el ambaŭ. La ICK rezervas al si ekzameni la detalojn de tiu ĉi projekto post ricevo de kompleta dokumentaro. Ĝi akcentas samtempe, ke la kompetenteco pri tia internacia iniciato estas sole en ĝia mano, en kunagado kun la respektivaj asocioj esperantistaj.

Bibliografio.

Die Unwirtschaftlichkeit der Vielsprachigkeit. (La neekonomio de l' multlingveco.) Germanlingva varbfolio, eldonita de Germ. Esp. Societo en Reichenberg.

Gazetoj pri Esperanto.

Le Cinéophile, Paris, nova kino-revuo, kies unua numero aperis en oktobro, regule enhavas rubrikon en Esperanto.

Bowes Park Weekly News, Bowes Park, London, 28. 11. Kun artikolo de „La Observanto“.

Magyar Biztosítástudományi Szemle, Budapest, 20. 11. 1930. Hungara revuo por asekuro-scienco. Publikigas resumon de la enhavo en lingvoj angla, franca, germana, itala kaj en Esperanto — laŭdinda aranĝo, rekomendata al aliaj revuoj. La Esp.-teksto estas bona; sed ni rekomendas forigi la preserarojn en la Esp.-teksto sur la titolpaĝo.

Mittelrheinische Volkszeitung, Bingen a. Rh., Germ., 1. 12. Kun noto pri la apero de la André-libro en Esperanto.

Saarbrücker Volkszeitung, Saarbrücken, Saar-teritorio, 24. 10. Kun artikolo „Ĉu ni bezonas mondhelpingvon?“.

Volks-Zeitung, Wien, enhavis en sia aldono „Sonntags-Beilage“ de 30. 11. artikolon pri Esp.-vojaĝoj de s-roj Frey, Scherer, Cech kaj Steiner.

Wien'aj Foiroj 1931.

La templimoj por Wien'aj Foiroj 1931, kiuj kiel kutime okazas tuj post la Leipzig'aj Foiroj, estis fiksataj por la printempa (jubilea) de la 8-a—15-a de marto, kaj por la aŭtuna de la 6-a—13-a de septembro 1931.

Leŝerkesio.

L. I. L. en R. Dankon por tre bona „Leŝer“: Vivu sekvantoj! Saluton!

P. B. en P. Certe estus bone, se la Esperanto-movado estus unuecigita. Sed malfacile estos atingi unuecon. Pri la tiurilataj klopodoj vi supozeble legis en Heroldo.

I. S. en B. Heroldo raportis mallonge pri la konferenco; sed ŝajnas al ni ke „T. K.“ misinterpretis la deklaron. Cetere, la informado de la gazetaro pri la konferenco ŝajne funkciis malbone.

Senlaborulo meditas.

Tutsola mi estas sur tero . . .

Min frosto tremigas — malsato min skuas;
En miajn ŝuojn la akvo enfluas,
Ĉar ili jam estas tute difektaj,
Kaj sameluzitaj, malbonaspektaj
Vestaĵoj-cifonoj. Min tuso atakas;
Pro febro-malvarmo la dentoj ekklakas.

Vespere mi serĉas dormejon, sed kie?
Por mi ja ekzistas hejmo nenie.
Vekiĝas en mi freneza deziro
Je varmo, feliĉo. — Nur vana sopiro!
Sen hejmo, sen amo — mizera vagulo
Mi fine mortaĉos en ia angulo.

Ho — senlaborula mizero:
Tutsola mi estas sur tero . . .

Sancele mi vagas tra stratoj post stratoj.
Envio min kaptas je miaj homratoj:
Ĉu ili en sia luksa komforto
Meditas pri senlaborula sorto?
Kaj se eĉ — ho vane ja ili nur penas;
Malsaton nur, kiu ĝin sentas, komprenas.

B. Zenker.

Por via distro kaj amuzo.

Pensosportaj problemoj.

Ekscita aventuro en la Silvestro-nokto.

Sinjoro Majro pasigis la Silvestro-vesperon en la najbara urbo kaj tie, en bonega socio, iomete tro multe regalis sin per bon-gustega punĉo.

En facila humoro, sed tamen tute regante siajn pensojn, li nokte hejmeniras sur la senhoma ŝoseo.

Subite alkuregas aŭtomobilo kun paligitaj lumjetiloj. Antaŭ ol li konstata, ke ĝi veturas tute kontraŭleĝe sur la malĝusta ŝoseflanko kaj antaŭ ol li sukcesas meti sin en sekuran lokon per kuraĝa salto, kotŝirmilo tuŝkaptis lin kaj puŝegis lin en la apud-ŝosean foson. La senskrupula kondukanto, ŝajnginta unue ekhalti, por helpi la akcidentinton, tamen ŝanĝas tuj sian intencon kaj rapide forveturas.

Sinjoro Majro, feliĉe restinta sufiĉe sen-difekta, prave koleregas pri tia konduto kaj decidas anonci la kulpulon ĉe tribunalo. Kiam la aŭtomobilo malplirapidigis la veturon, li bone povis legi la numeron — 243 795.

Ekscite sinjoro Majro serĉas en siaj poŝoj paperon kaj kraĵon, por tuj noti la numeron. Sian memoron li laŭsperte ne povas fidi, kaj kompreneble tute ne en sia nuna stato. Krome li estas ekŝvenonta. Do, ankaŭ la tiel nomitaj mnemoteknikaj helpoj ne subtenos lin memori kiel la numeron.

En siaj poŝoj li fine trovas pecon da papero: gazetfolio, sed nek kraĵon nek fontplumon nek ian alian skribilon. Mal-espere li serĉas helprimedon.

Kion farus vi en tia situacio? Pripensu, ke sinjoro Majro ne havas tempon por mediti. Ankaŭ vi ne bezonu pli da tempo ol du-trij minutojn por solvi la aferon!

La stranga ringo.



Ne estas malfacile fabrikaj el papero ringon kia estas bilde montrata ĉi-supre. Oni tondas longan strion da gazetpapero, tordas ĝin unu fojon kaj poste kungluas la du finaĵojn. Sed pli malfacila estas la respondo al la ŝajne facilega demando:

Kio ekestas, se oni distondas la paper-ringon ekzakte laŭ la mezo, tiel, kiel indikas la punktita linio?

Kiom da partoj oni ricevos?

Kiel ili aspektos?

(Represo ne permesita.)

Ne perpleksiĝu!

Kiom ofte okazas en la ĉiutaga vivo, ke iu en ŝajne tute komplika situacio ne trovas la plej simplan, preskaŭ okulfrapan solvon, nur pro tio, ke li — laŭ kutima posta klarigo — pensis pri ĉio alia, sed nur ne „ĝuste pri tio“. Poste, kiam estas tro malfrue, li



frapas sian kapon ne komprenante, kial tiel simpla demando povis lin embarasigi. Li konsolu sin: tute same okazas al la plej multaj, kun escepto de tiuj, kiuj estas disciplinitaj pensuloj.

Kaj nun, kiel ekzercu, unu tasko, kiu necesigas alumetojn, sed havas nenion komunan kun la kutimaj alumetaj ludoj, nek estas iu mistifikaĵo (kion ni speciale akcentas), sed estas serioza problemoj, tamen ne necesigas antaŭajn konojn; nur iom viglan fantazion oni bezonas havi por la solvo:

El tri alumetoj oni formas trilateron kiel supra bildo. Helpe de pliaj tri alumetoj estu formotaj ankoraŭ tri samgrandaj trilateroj, tiel ke nun la ses alumetoj

formu entute kvar samgrandajn trilaterojn. La unuaj tri alumetoj restas en neŝanĝita pozicio.

Kiu sukcesas fari tion en mallonga tempo? (Represo ne permesita.)

Ankaŭ taksadon oni devas lerni!

Kiu lernis bone taksi, posedas kapablon ofte tre utilan en la vivo. Jen por ekzercu malgranda tasko:

Sur la Tero vivas proksimume 1600 milioj da homoj. Kiom ampleksa estus proksimume la spaco bezonata por starigi tiujn homojn unu apud la alia sen interpreto? Nomu landon en Eŭropo, kiu laŭ via opinio havas la necesan amplekson!

Sed, ni petas, ne kalkulu, sed taksu! (Represo ne permesita.)



En la signo de la kristnaskaj aĉetoj.

„Bonan tagon, kara sinjorino Bagatelul — permesu, ke mi prezentu al vi mian edzon!“ (Judge.)

Pri la ŝparema skoto.

Skoto estis forlasinta sian hejmlandon por veturi kiel koloniisto Aŭstralion. Kiam li estis for, la homoj de lia iama loĝloko rimarkis kun miro, ke liaj patro kaj frato! kreskigis siajn barbojn. En la vilaĝo oni aŭdis tre diversajn supozojn pri tiu strangaĵo. Kelkaj asertis, ke la tri faris solenpromeson ne razi sin pli frue, ol kiam estos reveninta „Jock“ kiel milionulo. Fine iu najbaro ekkuraĝis demandante la pli junan el la du fratoj, kial...?

„Tute ne io pri solenpromeso aŭ similaĵo,“ respondis John. „Sciu, ke Jock kunportis la razilon, kiam li foriris Aŭstralion.“

Skota kafejestro ŝribas al la redakcio de angla spritaĵo-revu (en neafrankita letero): „Mi legas indignite, ke vi ĉiusemajne mokas min pro mia ŝparemo.“

Mi atentigas vin, se vi ne ĉesos tiun figadon, mi neniam plu pruntepetos vian revuon de miaj gastoj.“

Sur ŝipo, meze de la oceano, skoto iras al la ŝipkuracisto: „Sinjoro doktoro, de jaroj mi vojaĝas sur la maro, kaj ĉiam fariĝas marmalsana; la multkostaj manĝaĵoj iras el mia stomako ĉiuj en la maron. Kion mi faru?“

„Prenu“, respondas la kuracisto, „duon-penny-moneron inter viajn dentojn!“

Skoto deziras esti fotografata kaj iras al tajloro, por ke li gladu la pantalonon. „Unu ŝilingon kosta la gladado“, diras la tajloro.

„Ho, tio estas multa, bonvolu gladi por duonŝilingo la dekstran flankon de mia pantalonon, mi farigos foton en profila pozo.“

Anglaj bonhumorajoj.

„Ĉi tiu Londono“, diris amerikano, „estas la plej nebula lokaĉo, kiun mi iam vidis.“

„Ne“, diris Londonano, „mi foje estis en urbo, kie estis eĉ pli nebule.“

„Nu, aŭskultu“, diris la amerikano, „almenaŭ la nomon de tiu urbo mi ja dezirus scii!“

„Bedaŭrinde mi ne povas diri. Estis tiel nebule, ke mi eĉ ne povis legi tiun malbenindan nomon.“

„Kie vi denove estis?“ demandis suspekt-eme la infanvartistino la malgrandan Elinjon

„Bonco formangiĝis la ŝuoj de mia pupeto, kaj tial mi punis lin.“

„Kiel vi faris tion?“

„Mi iris al la manĝujo de Bonco kaj el-trinkis la tutan lakton.“

Nova direktoro de fabriko estis tre mal-multe ŝatata kaj sentis grandan malbonhumoron pri tio. Iun tagon li havis okazon paroli kun la plej maljuna oficisto de l' entrepreno kaj komencis iom plibonigi sian propran reputacion.


„Eble vi ne volos kredi, Jones“, li diris grandioze, „sed kiam mi forlasis mian antaŭan oficon, la laboristoj donacis al mi arĝentan tekruceton.“

„Guste“, diris Jones. „Ni donacos al vi oran, se vi ree foriros.“

Dommastro, batalinta kun enpenetrinta krimulo-ŝtelisto, kuŝis venkita surtere. La ŝtelisto tute kviete enpakis ĉiujn valoraĵojn, kiuj plaĉis al li.

„Ne forprenu, mi petas, almenaŭ tiun vazon“, diris la dommastro. „Mi gajnis ĝin en boksbatalo.“

„Mi ankaŭ“, diris la krimulo, metante ĝin en la sakon.



Sia venĝo.

Tiel okazis, ke s-ro Mirokulo post la klub-vespero ne povis eniri sian domon, kvankam li portis la domŝlosilon: lia edzino estis metinta la ŝtuparon al alia loko. (Judge.)

Organizo.


Du almozuloj intencis serĉi la feliĉon, kaj ili provis en granda fabriko, spite de la mizeraj tempoj. La unua atendis antaŭ la enirejo, intertempe la alia efektivigis la planon. La kontoroficistoj kontraŭstaris, tamen li atingis la plejsanktejon, la oficejon de la direktoro. La direktoro atente aŭskultis lin, premis poste stampilon sur papereton kaj diris al la viro: „Kun tio iru al la prokuristo!“ La prokuristo rigardis la paperon, premis ankaŭ stampilon sur ĝin kaj diris: „Kun tio iru al la kasisto!“ La kasisto rigardis la paperon, ankaŭ li premis sur ĝin stampon dirante: „Iru kun tio al la pordisto!“ La pordisto prenas la papereton, ekkaptas la almozulon je la kolo kaj ĵetas lin eksteren, ne dirante iun vorton.

La atendanta kolego ĝoje elvokas: „Vi estis tre longe en la fabriko! Kion vi ricevis?“



ŜAK-ANGULO

Problemo n-ro 6. — H. Rinck.



Blanko movas kaj gajnas.

Solvo de la problemoj n-ro 5.

Markwik. Mato post la tria movo. Blanko: Rh4, Kf4, Kf1, Ch3, Pg2 (5). Nigro: Rh1, Ph6, h7 (3).

1. Kf1—e2 (minacas Ke2—f3 kun g2—g4 mate), Rh1×g2
2. Rh4—h5! Rg2—h1 (×h3)
3. Ke2—f3 (f1) mate.

„Mi nenion ricevis, sed tiuj homoj havas organizon grandiozan!“

Tradukita el „Oberschlesischer Wanderer“ de M. Kloss, Katowice.

La procesio de mortintoj.

Maŭrico promenas kun sia patro; preteriras procesio funebra. Ĉerkon sekvas amaso da nigre vestitaj personoj.

Maŭrico ankoraŭ ne vidis tian procesion.

„Kio estas tio, patro?“


„Tio estas funebra procesio. Sed silentu, ne decas paroli, kiam mortintoj iras al la tombejo!“

Maŭrico silentas, ĝis la procesio preteriras, sed poste ekparolas: „Patro, la lastaj du mortintoj interparolis!“

Krucvort-enigmo

Kristnask-arbo.

(Ekster konkurso.)



Horizontale: 2. kristnaska arbo, 4. pro-jecki-tabulo, 6. granda laŭ vertikala direkto, 7. diservo, 9. loko de feliĉuloj, 13. malplezuro, 14. tasko, 15. vorteto por akcenti la identecon.

Vertikale: 1. Tre ŝatata kiel donaco, 2. teatraĵero, 3. tabelvorto, 4. itala insulo, 5. tabelvorto, 8. plej grava nutraĵo, 9. ujo, 10. sur la akvo oni faras ĝin, 11. prepozicio, 12. in-sekta bruoj.

La vortoj estas sen gramatikaj finaĵoj.

La solvoj de la ĉi-paĝaj problemoj aperos en unu el la venontaj numeroj.

1931

Riĉa je sukceso, prosper' kaj far'
Estu al vi ĉiuj la nova jar'!

1931

